

erseco vegetala generis diversecon de fitonimoj praktike senfinan. Ni elmontras kiel lastan demonstradon la nomojn de du plantoj el la plej komunaj, kie la sinonimaj serioj kongruas kun la klasifikado de argumentoj, de influoj aŭ motivaĵoj de la elekto, kiujn ni supre provis starigi.

Hypericum perforatum:

- **formo, aspekto:** *Millepertuis commun, Herbe à mille trous, Herbe percée, Trascalan perforé;*
- **utiligo:** *Herbe aux piqûres, Chasse – diable, pojarniță, sănițoare;*
- **popola etimologio:** *sunătoare, floare de foc viu, Trucheron jaune, Crugie;*
- **periodo de la florado:** *Herbe de Saint-Jean, Iarba Sfântului Ioan.*

Taraxacum vulgare:

- **simileco al bestoj:** *Dent de lion, Liodent, Coq, Groin de porc;*
- **simileco al aliaj plantoj:** *chicorée, cicoare;*
- **kiu serĉas ĝin:** *Salade de taupe, Laitue de chien;*
- **simileco al objektoj:** *Couronne de moine, Florin d'or.*

Rilate al la protektado de tiu abunda biodiverseco, malavara, ni devus rezigni pri la emo kolekti, rompi, detru, ĉiufoje kiam malbona kutimo vekiĝas en ni: alproprigi tro facile tion, kion oni konsideras "sovaĝa" – tio signifas "kio apartenas al neniu".

Bibliografio

- Borza Al.* (1968). Dictionar etnobotanic, Cluj.
Cabaret J. (1986). Plantes pour soigner les animaux, Ed. du Point Vétérinaire.
Danton Ph. & Baffraz M. (1995). Inventaire des plantes protégées en France, Ed. Nathan, Paris.
Diaconovich C. (1896, 1900-1906). Enciclopedia Română, Ed. Astra, Sibiu.
Larousse de la langue française, 1979, Lexis, Paris
Macrea D. (1958). Dictionarul limbii române moderne, Ed. Academiei RPR.
Simionescu I. (1973). Flora României, Editura Albatros.
Triska J. (1987). Flore d'Europe, Paris.

Adreso de la aŭtorino

D-rino Maria BUTAN
Aleea Ripensia 34 ap. 3
 RO 300-585 Timișoara
 RUMANIO

<butan_osiek@yahoo.com>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas profesorino pri la franca lingvo, instruis en la Beleta fakultato de la Universitato de Timișoara kaj poste en la Universitato pri Agrikulturaj Sciencoj de Banato, Rumanio. Doktorigis 1995 en Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj estas *PDoc.*

Asbesto – eterna koŝmaro

Martin EBNER

Asbesto estis la favorata materialo de la industria epoko. Hodiaŭ la venena polvo kaŭzas timon kaj terurajn kostojn.

"Atentu! Tio estas anonco de la biblioteka direktorino: Bonvolu tuj forlasi la domon! Atentu! Tio ne estas ŝerco..." Post trovaĵoj de asbesta polvo la biblioteko de la universitato en la germana urbo *Konstanz* estis evakuita dum duona horo. Librobretarojn nun atingas nur laboristoj kun protektvestoj kaj vizaĝmaskoj. La kolektado de asbestaj fibroj daŭros ankoraŭ monatojn. Tiamaniere materialo rememoriĝas, kiu iam promesis sekurecon kaj prosperon, sed hodiaŭ disvastigas timon kaj teruron.

Per la greka vorto *asbestos* (neestingebla/nedetruebla) oni nomas diversajn fibroformajn silikatajn mineralojn, kiujn oni kutime subĉiele ekspluatas. En Okcidentgermanio oni precipe prilaboris ĥrizotilon* (blanka asbesto) el la minejo de la konzerno "ETERNIT" en la kanada provinco *Quebec*, pli malofte ankaŭ la eĉ pli danĝeraran krokidoliton* (blua asbesto) el Sudafriko. En Orientgermanio dum mallonga tempo oni ekspluatis trovaĵojn en la provinco Turingio, sed precipe la slabokonstruaĵoj de la iama DDR enhavas ĥrisotilon el la rusa urala regiono.

En la jaro 1905 la aŭstra inventisto *Ludwig Hatschek* ricevis patenton por eksterordinare konservebla miksaĵo de cemento kaj asbesto, kiun li baptis "Eternit", laŭ la latina vorto "aeternus" (t.e. "eterna"). Ekde tiam oni prilaboris la plej grandan parton de la vendita asbesto en tegmentplatojn, akvokondukilojn kaj aliajn cementajn produktojn. Tamen la materialo, kiun oni laŭdis kiel "mineralon de mil ebloj", povas multe pli: Asbesto ne brulas, ne rustiĝas kaj ne putras. Ĝi estas malpeza kiel aluminio, sed pli tiro-

* La plej gravaj specoj de asbesto nomiĝas *Chrysotil* kaj *Krokydolito* en la germana lingvo. Ni uzis por *Chrysotil* ne la PIVan "krizotilo" sed "ĥrizotilo" (laŭ la propono de *Kavka* en SR 1/2003 "Scienca Vortaro", p.32) kaj esperantigis *Krokydolito* al "krokidolito".

tirorezista ol ŝtala drato. Oni povas teksti asbestajn tekstilaĵojn. Asbesto elstare izolatas kontraŭ kurento, varmo kaj sono, krome ĝi havas grandan reziston kontraŭ frotado kaj ĥemiaĵoj. Neniu alia materialo prezentas tian kombinon.

Unue oni uzis tunojn da asbesto por protekti militŝipojn kontraŭ fajro kaj sala maraero. Dum la industriigo sekvis pli ol 3 500 aliaj aplikoj. Delonge ne nur protektvestoj por laboristoj ĉe altfornoj kaj fajrobrigadoj: sen asbestaj hermetikigiloj neniu vaporkaldrono, neniu pumpilo, neniu maŝino; sen asbestaj bremsoj neniu rapideco sur stratoj kaj reloj, ĉe liftoj aŭ lavmaŝinoj.

Ŝprucasbesto protektis la ŝtalajn konstruaĵojn de nubskrapuloj kontraŭ fajro kaj ŝirmis la aeroŝaktojn de klimatiziloj kontraŭ sono. Asbesto gardis stratajn surfacojn kaj plastplankojn kontraŭ eluziĝo. Asbestaj filtriloj purigis vinon kaj bieron. Ĉar la pulvoro estis tiom malmulte kosta, oni uzis asbeston kiel plenigmaterialon en plasto, eĉ en dentopasto.

Bedaŭrinde la mirakla materialo havas gravan malavantaĝon: asbestaj fibroj facile dissplitiĝas, kelkfoje sufiĉas aerbloveto. Per nuda okulo aŭ kutima mikroskopo oni ne vidas la partiklojn, kiuj povas eniri la korpon. Kiel profesiaj malsanoj kaŭze de asbesto validas cikatraj histoj (pulma kaj pleŭra asbesta malsano) kaj malignaj tumoroj (pulma kaj laringa kancero). Oni apenaŭ povas ilin sanigi.

Speciale perfida estas la mezoteliomo: tiu malofta peritonea kancero povas esti kaŭzata eĉ de mallonga kaj malgranda kontakto kun asbesto; la latenteco ĝis la eksplodo de la malsano daŭras averaĝe pli ol 40 jarojn - post la diagnozo la morto venas en malmultaj monatoj.

Usonaj asekurkompanioj analizis statistikojn kaj rifuzis, jam ekde 1918, vendi viv-asekurojn al asbesto-laboristoj. En Novjorko okazis en 1964 la unua kongreso pri asbestaj danĝeroj. Tamen ĝuste en tiu momento en Eŭropo la eŭforio vere komenciĝis.

La germanaj asbesto-importoj atingis en 1976 per 189 000 tunoj sian kulminon. Sindikatoj kaj naturprotektantoj organizis kampanjojn kontraŭ asbesto, sed la produktistoj longtempe defendis sin helpe de aĉetitaj ekspertizoj kaj aliaj propagandaj metodoj.

En Germanio asbesto nur en 1995 estis definitive malpermesita, en la tuta Eŭropa Unio nur en 2005. Do malgraŭ la pruvita nesalubreco de asbesto kaj antaŭvideblaj renovigkostoj, la produktistoj povis trankvile vendi siajn stokojn.

Je la 31a decembro 2010 finis in la Eŭropa Unio la lasta permesita uzo de asbesto, nome en diafragmoj por klorbaza elektrolizo. Sed la konsekvencoj de asbesto longtempe akompanos nin. La centra oficejo de akcidentasekuraj kompanioj en Germanio, la GSV en la urbo *Augsburg*, registris de tegmentisto ĝis aŭtomeĥanikisto, de plankinstalisto ĝis vinkultivisto pli ol 500 000 laboristojn, kiuj foje laboris kun asbesto. En la jaro 2007 la asekurkompanio registris en Germanio pli ol 1 500 mortokazojn kaŭzitajn de asbesto kaj preskaŭ 4 000 novajn malsaniĝojn. Notu bone, ke tio temas nur pri asekuritaj laboruloj. La asbesta malsano de dommastrino, kiu dum jaroj purigis la laborvestojn de sia edzo, ne validas kiel profesia akcidento. Pro la longa latenteco oni antaŭvidas la germanan kulminon de asbesto-malsaniĝoj ĉirkaŭ la jaro 2015.



Bildo 1: La forigon de asbestentenantaj ondotegmentoj oni prefere lasu al spertuloj – nepre ne mem prilaboru per borilo aŭ broso! La “konstrumiraklaĵo” estas treege danĝera. En 2007 estas registritaj (sole en Germanujo) pli ol 1500 mortokazoj pro asbesto. (Foto: Fotolia)

Ekster Eŭropo kontinuas dume la asbesto-produktado en ĉirkaŭ dekduo da landoj. Rusio estas kun po miliono da tunoj en jaro la gvidanto en la monda merkato, sed foruzas ĝin plejparte mem – tute honeste. Kontraŭe la kanadanoj havas rigorajn sekurecregulojn por sia propra lando; ili eksportas sian asbeston preskaŭ komplete al Ĉinujo, Hindujo kaj aliaj regionoj, kie homaj vivoj ne estas tiom multekostaj. Kanado estas la unika okcidenta industria lando, kiu blokas klopodojn de internaciaj organizoj, restrikti la komercon de asbesto. Kaŭze de konstruadhaŭso en aziaj metroj ne nur asbesto-sanigistoj “povas esperi”. Advokato por asbesto-viktimoj hodiaŭ estas en Usono preskaŭ propra profesio. En la itala urbo Turino aktuale okazas mamuta proceso kontraŭ la svi-

sa miliardulo *Stephan Schmidheiny* kaj aliaj estroj de la konzerno “*ETERNIT*”: al la 4 000 akuzantoj apartenas posteuloj de asbesto-mortintoj, sed ankaŭ ekzemple la itala labor-asekurkompanio, kiu volas ricevi repagon de 245 milionoj da eŭroj. Oni aŭskultos pli ol 500 atestantojn, La akuzoakto havas pli ol 220 000 paĝojn, oni antaŭvidas la verdikton meze de 2011. Asbesto estas jam delonge ne tiom malmulte kosta kiom oni pensis iam, sed ĝi kreas multajn laborlokojn.

Neniam enspiru asbestopolvon!

- Asbesto estas sendanĝera, se oni ĝin nur rigardas. Danĝera estas asbesto, se malgrandaj fibroj de tiaj perfidaj mineraloj eniras la korpon. Oni ne povas tute eviti la inhalon: eĉ la pura aero de la Arkto enhavas ĉirkaŭ po 100 fibrojn (F) en kuba metro, ankaŭ el naturaj fontoj. Por internaj spacoj oni klopodas atingi malpli ol 500 F/m³. La elfluaero de industriaj entreprenoj rajtas enhavi 10 000 F/m³, la eŭropa limo por laborlokoj estas 100 000 F/m³.
- Pro sekurecaj kialoj oni plejeble foriru el la vojo de asbesta polvo. Tamen oni optike ne facile ekkonas la materialon kaj konfuzas ĝin kun aliaj malpli danĝeraj substancoj. Konforme multakosta estas la eliminado de la ege venena ŝpruc-asbesto, kiun oni prilaboris kaj uzis ĝis 1979 en multetaĝaj domoj kaj multaj publikaj konstruaĵoj.
- En privataj hejmoj oni ofte trovas asbeston en malnovaj elektraj mastrumiloj, ekzemple en hejt-instalaĵoj, fornoj, panrostiloj, kinematografoj, teniloj de marmitoj aŭ en gladiloj. Plankosurfacoj ofte estas asbesto-kusenoj kun polivinilklorido. Oni ne drilu ĉe florkestoj, ondoplataj tegmentoj de aŭtoremizoj aŭ tablotenis-platoj faritaj el asbesta cemento, oni ne segu aŭ frotlavu per dratbroso, precipe ne sekamaniere. Asbesto-ruboj estas “danĝera speciala rubaĵo”.

Adreso de la aŭtoro

Martin EBNER

Bei der Bachbruck 6

DE – 78315 Radolfzell-Böhringen / GERMANIO

<martinebner@hotmail.com>

Priaŭtora informo

Ĵurnalisto por germanlingvaj gazetoj. La supran artikolon esperantigis la aŭtoro kun afabla helpo de s-ino *Irmtraud Bengsch*.

Lertaj afrikaj lignoskulptistoj – la makondanoj

Rüdiger SACHS

Enkonduko

Makondo estas la nomo de popolo kaj ankaŭ la nomo de altebenaĵo en la Orienta Afriko. En la limregiono inter Tanzanio kaj Mozambiko troviĝas – ambaŭflanke de la Ruvumo-rivero – la origin-setleja teritorio de la “*Wamakonde*” (la antaŭsilabo “*wa*” signifas en la svahila lingvo la pluralon). Temas pri malfacile alirebla altebenaĵo kun nur malabundo da akvo, kies malfekundeco necesigas homan kunvivadon en profunda komuneco kaj strikta helpemo kaj reciproka helpopreteco.

La portugalaj koloniistoj kaj postaj okupadaj potencoj nur malmulte stimulis aŭ prosperigis la evoluon de la makonda popolo. Pro tio multaj makondanoj elmigris al la norda Tanzanio, kie ili trovis laboron sur farmbienoj kaj sisalplantejoj. Post farita laboro – aŭ eĉ kiel ĉefa tasko – ili komencis krei lignajn skulptaĵojn, kaj kelkaj spertuloj ekpraktikis la lignoskulptadon kiel esencan profesion.

La makonda arto

Laŭnature sentoplenaj, impete koleremaj kaj pro sklava laboro turmentataj, la makondanoj trovas ĉe la lignoskulptado – kaj precipe dum la dancado – la bezonatan bufron por forkapti la ŝokojn de sia povra vivo. Ĝenerale korpe malgrandaj, tamen persiste kuraĝaj, eĉ obstinaj, la makondanoj naskis propran artan skulptostilon el la malfortaj flankoj, bonaj ecoj kaj karakteraj proprecoj de sia raso. La skulptado tradiciiĝas de generacio al generacio. Se aldoniĝas natura talento aŭ granda kapableco kun lern sukcesoj estiĝas mirigaj kaj admirindaj verkoj el homaj korvarmeco kaj delikatsentemo, kiuj kuniĝas kun fortika humuro kaj karikaturema inklinio. Realismaj aŭ abstrakte superrealismaj artostiloj paraleliĝas aŭ interŝanĝiĝas. La skulptistoj, kiuj ofte faras siajn laborojn en la ombro de Mango-arbo – la tutan tagon surtere sidante kaj tenante la lignon, mahagonon aŭ ebonon, inter siaj piedoj – diras: “Ni